

32 GRAFINO

„La ekstravagancaj virinoj," diris sinjoro Polgár, „faras iam aferojn, kiujn oni ne kredus. Tio estis en la jaro dekaŭa aŭ dudeka, nu koncize en la jaroj, kiam ĉie en ĉi tiu benita Mezeŭropo la aferoj danĝeregis, oni nur atendis, sur kiu flanko komenciĝos la tumulto. Tiam svarmis spionoj ĉe ni, vi eĉ ne povas sciati.

Tiutempe mi havis en mia fako kontrabandon kaj falsan monon, sed soldatoj iam-tiam vokis min, por ke mi havigu al ili iajn informojn. Tiam okazis la epizodo kun la grafino ... ni diru Mihályová. Jam mi ne scias, kiel kaj kiamaniere, sed tiam ricevis soldatoj anoniman leteron, ke ili atentu korespondataĵon, kiu estas sendata al la adreso W. Manasses, poŝtrestante Zuriko. Poste ili retenis ian tian leteron; je mia animo, ĝi estis ĉifrita laŭ la kodo 11 kaj en ĝi estis prisoldataj komunikoj tiaspecaj, ke la infanteria regimento 28 garnizonas en Prago, ke en Milovice estas pafejo kaj ke nia armeo estas armita ne nur per fusiloj, sed ankaŭ per bajonetoj; nu mallonge, tiaj idiotaĵoj. Sed vi scias, la soldatoj estas je tio ege severaj; se vi perfidus al iu fremda ŝtato, ke nia infanterio portas kalikotajn piedtukojn de firmao Oberländer, por tio vi staros antaŭ divizia tribunalo kaj ricevos almenaŭ unu jaron pro spionado. Sed tio apartenas jam al la soldata prestiĝo.

Tiam montris al mi la soldatoj la ĉifritan leteron kaj ankaŭ la anoniman denuncon. Aŭskultu, mi ne estas grafologo, sed unuavide mi diris al mi, ĉi frenezulo, ambaŭ leteroj aspektas kiel de la sama mano. La anonima denunco estas tamen skribita krajone - plejparto da anonimaj leteroj estas skribita krajone: sed estis konstateble, ke la spiono kaj la denunciinto estas laŭvorte la sama mano. Sciu, mi diris al la soldatoj, lasu tion nerimarkanta; ĝi ne valoras, spiono estas ia amatoro; liajn militajn sekretojn povas legi ĉiu en ĵurnalo Politiko. Nu bone.

32 GRÓFINKA

„Tyhle bláznivé ženské," pravil pan Polgár, „ty někdy provádějí věci, to by člověk nevěřil. To bylo v roce devatenáct nebo dvacet, zkrátka v těch letech, kdy všude v téhle pozeňnané střední Evropě hořela koudel; člověk jenom čekal, na které straně se strhne mela. To se vám tehdy u nás hemžilo špiónů, ani nemáte ponětí.

Já jsem v té době měl v referátě kontraband a falešné peníze, ale vojáci si mě občas zavolali, abych jim sem tam opatřil nějaké ty informace. Tak tehdy se stal ten případ s tou grófinkou... řekněme Mihályovou. Já už nevím jak a kterak, ale tehdy dostali vojáci anonymní dopis, aby si dali pozor na korespondenci, která se posílá na adresu W. Manasses, poste restante Curych. Pak zachytili jeden takový dopis; namouduši, byl šifrovaný podle kódu číslo 11 a byla v něm vojenská sdělení toho druhu, že pěší pluk číslo 28 je posádkou v Praze, že v Milovicích je střelnice a že naše armáda je ozbrojena nejen puškami, nýbrž i bodáky; zkrátka takové volovinky. Ale to víte, tihle vojáci jsou na to strašně přísní; kdybyste vyzradili nějaké cizí mocnosti, že naše pěchota nosí onuce z kalika od firmy Oberländer, tak za to budete stát před divizním soudem a dostanete aspoň rok pro zločin vyzvědačství. Ale to už patří k té vojenské prestiži.

Tedy tenkrát mně ukázali vojáci ten šifrovaný dopis i to anonymní udání. Poslouchejte, já nejsem žádný grafolog; ale na první pohled jsem si řekl, to jsem blázen, vždyť to oboje psaníčko vypadá jako z jedné ruky. To anonymní udání je sice psáno tužkou – většina anonymních dopisů je totiž psána tužkou; ale to se dalo poznat, že ten špión i ten udavač je doslovně jedna ruka. Tak víte co, řekl jsem vojákům, nechte to plavat; ono to nestojí za to, ten vyzvědač je nějaký amatér; ty jeho vojenské tajnosti si může každý přecíst v Politice. Nu dobrá.

Proksimume post unu monato venis al mi iu kapitano de kontraŭspionado, tia bela kaj svelta ulo. Sinjoro Polgár, li diras al mi, jen mi havas ian strangan aferon. Antaŭ nelonge mi dancis kun bela bruna grafidino; ĉeĥe ŝi ne scias, sed dancas, nu plezurego. Kaj hodiaŭ mi ricevis de ŝi sentimentaln leteron. Tion oni ne faras ja. Ĝoju, junulo, mi diris al li. Tion oni nomas feliĉo ĉe virinoj.

Hm, sinjoro Polgár, rediris al mi konsternite la kapitano, sed la letero estas skribita per la sama skribo kaj inko kaj sur la sama papero kiel la spionraportoj al Zuriko! Nu mi ne scias, kion fari; vi scias, kiel estas al viro, kiam li devas denunci virinon, kiu... hm, kiu estas al li... kaj entute, ŝi estas ja damo, homo, li hastvortigas ekscitite.

Jes, kapitano, mi diris al li, jen la kavaliraj sentoj. La virinon vi devas arestigi kaj konsiderante la gravecon de la kazo ni kondamnos ŝin al morto; kaj vi havos la honoron, ke vi komandos al dek du soldatetoj ‚Pafu!‘ Vi scias, la vivo estas jam tiel romantika. Sed bedaŭrinde estas ĉi tie unu malhelpo. Neniu Manasses ekzistas en Zuriko kaj je lia nomo kuŝas ĝis nun dek kvar ĉifritaj leteroj poŝtrestante en Zurika poŝtejo. Homo, lasu tion kaj iru denove danci kun la bruna grafidino, dum vi estas juna.

Tiu kapitano tri tagojn turmentis sin pro la konscienc-riproĉoj, ĝis li malgrasiĝis de tio kaj poste tamen anoncis tion al sia ĉefo. Memkomprene, ses soldatoj en aŭto veturis aresti la grafidinon Mihalyová kaj traserĉi ŝiajn paperojn; tie ili trovis la kodon kaj diversajn leterojn de eksterlandaj politikaj agentoj, laŭenhave ŝtatperfidajn. Ĉe tio la grafidino rifuzis doni kian ajn respondon kaj ŝia fratino, dekŝes-jara bubino, eksidis sur la tablo kun la genuoj submentone por videbligti ĉion, fumis cigaredojn, flirtis kun la oficiroj kaj petolege ridis.

Ekaŭdinte, ke oni arestis Mihalyová'n, mi kuris al soldatoj kaj diras al ili: Pro Jesuokristeto, liberigu la histeriulinon, el tio estos nur fiasko!

Asi za měsíc přišel za mnou jeden kapitán od kontrašpionáže, takový pěkný a štíhlý chlapík. Pane Polgáre, povídá mně, já mám tuhle takovou divnou věc. Onehdy jsem tančil s takovou krásnou hnědou komtesou; česky ona neumí, ale tančí, to vám je jedna radost. A dnes jsem od ní dostal sentimentální dopis. To se přece nedělá. Tak buďte rád, mládenče, řekl jsem mu. Tomu se říká štěstí u ženských.

Ale, pane Polgáre, řekl mi na to ten kapitán zdrceně, když on ten dopis je psán tímž písmem a inkoustem a na stejném papíře jako ty špiónské zprávy do Curychu! Já teď nevím, co mám dělat; to víte, jak je chlapovi, když má udat ženskou, která... hm, která je k němu... a vůbec, vždyť je to dáma, člověče, vyhrkl rozčileně. Jo, kapitáne, řekl jsem mu, to jsou ty rytířské city. Tu ženskou musíte dát zatknout a vzhledem k vážnosti případu ji odsoudíme k smrti; a vám se dostane té cti, že budete velet dvanácti vojákům ‚Palte!‘ To víte, život už je tak romantický. Ale bohužel, je tady jedna překážka: on žádný W. Manasses v Curychu neexistuje a na jeho jméno leží dosud čtrnáct šifrovaných dopisů poste restante na curyšské poště. Člověče, nechte to být a jděte zas tancovat s tou hnědou komteskou, dokud jste mladý.

Tedy ten kapitán se vám tři dny trápil výčitkami svědomí, až z toho zhubl, a pak to přece jen udal svému šéfovi. To se rozumí, šest vojáků jelo v autě zatknout komtesu Mihály a prošťárat její papíry; našli tam ten kód a všelijaké dopisy od zahraničních politických agentů obsahu, jak se říká, velezrádného. Přitom ta komtesa odpírala jakoukoliv odpověď a její sestra, šestnáctiletá žába, si sedla na stůl s koleny pod bradou, aby bylo všechno vidět, kouřila cigarety, flirtovala s oficiéry a smála se jako blázen.

Když jsem slyšel, že Miháličku zatkli, běžel jsem k vojákům a povídám jim: Prokrindapána, pusťte tu hysterku, vždyť z toho bude jen ostuda!

Sed ili diris al mi: Sinjoro Polgár, grafidino Mihalyová konfesis al ni, ke ŝi estas en servoj de eksterlanda spionado; tio estas grava afero. Tiu virino mensogas ja, mi kriis je ili. - Sinjoro Polgár, diris al mi tiu kolonelo severe, memoru, ke vi parolas pri la damo; grafidino Mihalyová parolas la veron. - Sciu, tiu virino ravis la soldatojn. - Tondro batu vin, mi insultis, vi kondamnos ŝin pro nura galanteco! Diablo prenu viajn kavalirajn sentojn! Ĉu vi ne vidas, ke tiu virino mem intence kondukis vin al spuro de sia ŝtatperfida agado? Ŝi estas friponino, ne kredu al ŝi eĉ vorton. Sed la soldatoj nur ŝultrolevis kun tragika kompato.

Memkomprene la gazetoj estis plenplenaj de tio, ankaŭ en eksterlando: nobelaro de la tuta mondo estis kvazaŭ en sele kaj kolektis protestajn subskribojn, diplomatoj faris demarŝojn, publika opinio ĝis Anglio ekscitiĝis, sed la justeco, tion vi scias, estas nefleksebla; sume la nobela grafidino, konsiderante la militstaton, estis starigita antaŭ la divizian tribunalon.

Ankoraŭ foje mi iris al la soldatoj - tiam mi havis jam miajn informojn - kaj diras al ili: Donu ŝin al mi, mi punos ŝin anstataŭ vi - tute ne, nepre ili ne volis aŭdi. Sed la proceso estis ege bela; mi sidis tie kaj estis kortuŝita kiel dum la prezentado de Damo kun Kamelioj. La grafidino, maldika kiel sago kaj bruna kiel bedueno, konfesis sian kulpon. - Mi fieras, ŝi diris, ke mi povis servi al malamikoj de ĉi tiu lando.

La tribunalo povis ŝiriĝi pro la tutplena ĝentileco kaj severeco; sed kia helpo, estis ĉi tie la ŝtatperfidaj leteroj kaj la aliaj stultaĵoj kaj la tribunalo konsiderante la eksterordinare malgravigajn kaj eksterordinare pligravigajn cirkonstancojn ne povis alie, ol kondamni grafidinon Mihalyová al unujara karcero. Kiel dirite, mi neniam vidis tiom belan juĝon.

Poste la grafidino ekstaris kaj klarvoĉe deklaris: Sinjoro prezidanto, mi konsideras mia devo konstati, ke dum la enketado kaj aresto ĉiuj ĉeĥoslovakaj oficiroj kondukis al mi kiel perfektaj ĝentlemanoj. Tiam mi, pro emocio, ploraĉis preskaŭ laŭte.

Ale oni mně řekli: Pane Polgáre, komtesa Mihály se nám doznala, že byla ve službách zahraniční špionáže; a to je vážná věc. – Vždyť ta ženská lže, křičel jsem na ně. – Pane Polgáre, řekl mně přísně ten plukovník, pamatujte, že mluvíte o dámě; komtesa Mihály mluví pravdu. – Víte, tak ta ženská ty vojáky okouzila. – Hrom do vás, nadával jsem, tak vy ji ze samé galantnosti odsoudíte! Čert vem vaše rytířské city! Copak nevidíte, že vás ta ženská sama a schválně uvedla na stopu své velezrádné činnosti? Vždyť je to neřád, nevěřte jí ani slovo! Ale vojáci jen krčili rameny s tragickým politováním.

To se rozumí, byly toho plné noviny, i za hranicemi; šlechta celého světa byla na koni a sbírala protestní podpisy, diplomati dělali demarše, veřejné mínění až v Anglii se pobouřilo, ale spravedlnost, to víte, je neoblomná; zkrátka urozená grófkina byla vzhledem k válečnému stavu postavena před divizní soud.

Ještě jednou jsem šel k vojákům – to už jsem měl své informace – a říkám jim: Dejte mně ji, já vám ji potrestám – kdepak, nechtěli ani slyšet. Ale ten soud byl moc krásný; já jsem tam seděl a byl jsem vám dojat jako na Dámě s kaméliemi. Grófkina, tenká jako šíp a snědá jako beduín, doznávala svou vinu. – Jsem hrda, řekla, že jsem mohla sloužit nepřátelům této země.

Soud se mohl přetrhout samou zdvořilostí a přísností; ale nic platno, byly tu ty velezrádné dopisy a jiné pitomosti, a tu soud se zřetelem na mimořádně polehčující a mimořádně přitěžující okolnosti nemohl jinak než odsoudit komtesu Mihályovou na rok do vězení. Jak říkám, tak krásný soud jsem jakživ neviděl.

Potom komtesa vstala a jasným hlasem prohlásila: Pane předsedo, považuji za svou povinnost konstatovat, že se během vyšetřování a vazby všichni českoslovenští důstojníci ke mně chovali jako dokonalí džentlmeni. – To už jsem brečel pohnutím skoro nahlas.

Sed tamen estas tiel: kiam oni scias la veron, la lango onin jukas; simple oni devas tion diri. Mi opinias, ke la homoj parolas la veron ne pro malico aŭ malsaĝo, sed pro ia neceso aŭ nerezistebla impulso. Imagu, tiu Mihályeta konatiĝis en Vieno kun la fama majoro Westermann kaj enamiĝis al li. Vi scias ja, kiu estas tiu Westermann: li estas ulo, kiu praktikas heroecon kiel metion; ordenoj tintegas sur li, Maria Terezia, Leopoldo, Fera Kruco, turkaj steloj kun brilantoj kaj mi ne scias, kion li kolektis al si dum la milito; tiu Westermann estas gvidanto de ĉiuj eblaj eksterleĝaj organizoj, konspiroj kaj puĉoj, se temas pri monarkiistoj. Al ĉi tiu heroo la grafidino enamiĝis kaj versimile ŝi volis akiri kavalirajn spronojn por esti inda je li; sume pro amo al li ŝi pretekstis spionadon, kaj mem perfidis tion pri si, por atingi martiran gloron. Tian aferon scias fari nur virino.

Mi iris en malliberejon, kie ŝi sidis kaj igas ŝin veni. Madame, mi diras al ŝi, rigardu, estas enuege sidi la tutan jaron en karceroj; eblas prezenti peton pri la nova proceduro, se vi bonvolus konfesi, kiel ĝi estis kun tiu via supozata spionado. Mi konfesis jam, sinjoro, diris la grafidino glacie, kaj mi havas nenion por diri. Sed Jesuomarieta, mi hastvortigis, lasu la stultaĵojn; majoro Westermann estas jam dek kvin jarojn edziĝinta kaj havas tri infanojn!

La grafidino mortpaliĝis kiel cindro; ankoraŭ mi ne vidis virinon tiel subite malbeliĝi. - Ĉu... ĉu tio rilatas min? ŝi ekvortigis, dentklakante. Kaj ankaŭ tio povas vin interesi, mi kriis, ke tiu via majoro Westermann fakte nomiĝas Venceslao Málek kaj estas bakisto el Prostějov, ĉu vi komprenas? Jen vi havas lian malnovan foton; nu, ĉu vi ekkonas lin? Pro Jesuokristeto, grafidino, por tia fripono vi iris en karceron?

Mihályová sidis kvazaŭ ligneca; subite mi vidis, ke fakte ŝi estas maljuna fraŭlino, kies vividealo falruliĝis. Mi bedaŭris ŝin kaj iom mi hontis.

Jenže to máte to: když člověk ví pravdu, tak ho svrbí jazyk; prostě musí s tím ven. Já myslím, že lidé neříkají pravdu ze zlomyslnosti nebo hlouposti, nýbrž z jakési potřeby nebo neodolatelného puzení.

Tak si představte, ta Mihálička se kdesi ve Vídni seznámila s pověstným majorem Westermannem a zamilovala se do něho. Vy přece víte, kdo to ten Westermann je: to je chlap, který provozuje hrdinství jako řemeslo; řády na něm jen řinčí, Marie Terezie, Leopold, Železný kříž, turecké hvězdy s brilanty a já nevím, co všecko si za války nasbíral; tedy ten Westermann je vůdcem všech možných ilegálních organizací, spiknutí a pučů, pokud jde o monarchisty. Tedy do tohohle hrdiny se grófinka zamilovala a nejspíš si chtěla získati rytířské ostruhy, aby ho byla hodna; zkrátka z lásky k němu předstírala špionáž a sama ji na sebe prozradila, aby došla slávy mučednické. Takovou věc dovede jenom ženská.

Tak já jsem šel do vězení, kde seděla, a dám si ji zavolat. Madam, povídám jí, koukněte se, ono to je otrava sedět celý rok v kriminále; ono by šlo podat žádost o nové řízení, kdybyste se nám ráčila přiznat, jak to bylo s tou vaší domnělou špionáží. Já jsem se už přiznala, pane, řekla mně komteska ledově, a nemám dál co říci. Ale ježíšmankote, vyhrkl jsem, nechte už těch hloupostí; vždyť major Westermann je patnáct let ženat a má tři děti!

Grófinka vám zesinala jako popel; to jsem ještě neviděl ženskou tak rázem zošklivět. – Co... co je mi po tom? vypravila ze sebe, ale zuby jí cvakaly. A to taky vás může zajímat, křičel jsem, že ten váš major Westermann se vlastně jmenuje Václav Málek a je pekař z Prostějova, rozumíte? Tadyhle máte jeho starou fotografii; nu, poznáváte ho? Prokristapána, komtesko, pro takového kujóna jste šla do kriminálu?

Mihálička seděla jako dřevěná; najednou jsem viděl, že to je vlastně stará panna, které se zhroutil její životní sen. Bylo mně jí líto a jaksi jsem se styděl.

Madame, mi diras rapide, interkonsentite: mi sendos al vi ĉi tien advokaton kaj vi diros al li - Mihályová rektiĝis, pala, sed streĉita kiel pafarko. Ne, ŝi elspiris, ne necesas; al neniuj mi havas ion por diri. Kaj ŝi iris. Sed post la pordo ŝi falis; oni devis perforte disetendi ŝiajn fingrojn, tiel spasme rigidajn ŝi havis ilin.

Mi lipmordis. Nu, jam ĝi estas malkaŝita, mi diris al mi, la vero estas savita. Sed, sakre, ĉu tio estas la tuta vero? Ĉiuj malkovroj kaj elreviĝoj, amaraj veroj, seniluziigoj kaj amaraj spertoj, tio estas ja nur parteto de la vero; la tuta vero estas pli granda; la tuta vero estas, ke granda kaj fantazia estas la amo, fiero, pasio, ambicio, ke ĉiu ofero estas heroo, kaj ke la homa estaĵo en sia amo estas io bela kaj mireginda. Jen la dua kaj granda duono de la vero; sed oni devus esti poeto por povi tion vidi kaj diri."

„Tute ĝuste, diris policisto Horálek; „ĉio dependas de tio, kiel oni diras la veron. Pasintjare ni kaptis iun fraŭdinton kaj kondukis lin al daktiloskopio por preni de li daktiloskopian premsignon; kaj la bubo hop, saltis el la fenestro en la unua etaĝo sur straton kaj komencis kuri. Nia daktiloskopo estas ja pli aĝa sinjoro, sed en tiu momento li ne ekpensis pri tio kaj hop! li saltis post lin kaj rompita al si la kruron. Tio nin kolerigis, kiel ĉiam, kiam al niulo io okazas; kaj kiam ni ricevis la knabon, ni prilaboris lin iom inter ni.

Kiam estis asizo kaj ni estis vokitaj kiel atestantoj, diras al ni advokato de tiu bubo: Sinjoroj, mi ne volas prezenti al vi malagrablajn demandojn, kaj se tio ne plaĉos al vi, vi ne bezonas doni al mi respondojn - sciu, la advokato estis glata kiel boteleto da veneno. Sed kiam mia kliento provis fuĝi, vi batregalis lin en la policejo, ĉu? Tute ne, mi diris, ni nur rigardis, ĉu li ne vundis sin pro tiu salto, kaj vidinte ke ne, ni riproĉis lin. Ĝi certe estis ega riproĉo, diris la advokato kun ĝentila rideto. Laŭ atesto de polica kuracisto mia kliento, sekve de la riproĉado, havis tri ripojn rompita kaj proksimume sepcent kvadratcentimetrojn da ekimozo, ĉefe sur la dorso.

Madam, povídám honem, tak platí; já vám sem pošlu vašeho advokáta a vy mu řeknete – Mihálička se vztyčila, bledá, ale napjatá jako luk. Ne, vydechla, není třeba; nemám komu co říci. A šla. Ale za dveřmi padla; museli jí páčit prsty, jak je měla křečovitě ztuhlé.

Já jsem se kousal do rtů. Nu, už je to venku, řekl jsem si, pravda je zachráněna. Ale, hergot, copak je tohle celá pravda? Vždyť všechna tahle odhalení a zklamání, ty trpké pravdy, deziluze a hořké zkušenosti, to je jen ždibec pravdy; celá pravda je větší; celá pravda je, že velká a bláznivá věc je láska, pýcha, vášně a tížadost, že každá oběť je hrdinská a že lidský tvor ve své lásce je něco krásného a úžasného. To je ta druhá a ta velká půlka pravdy; ale to by člověk musel být básník, aby to dovedl vidět a říci."

„Zcela správně," pravil policejní strážník Horálek, „ono vždycky záleží na tom, jak se ta pravda řekne. Vloni jsme sebrali jednoho defraudanta a dovedli jsme ho do daktyloskopie, aby mu vzali daktylky; a ten kluk vám šups, skočil z okna v prvním patře na ulici a začal utíkat. Ten náš daktyloskopista sic je starší pán, ale on si nato v tu chvíli nevzpomněl, a šups, skočil rovnou za ním a zlomil si nohu. To teda nás dožralo, jako vždycky, když se něco našemu člověku stane; a když jsme toho kluka dostali, vzali jsme ho drobet mezi sebe.

Když pak byla porota a my jsme byli voláni jako svědci, povídá nám advokát toho kluka: Pánové, já vám nechci klást nepříjemné otázky, a je-li vám to nemilé, nemusíte mi dát odpověď – víte, ten advokát byl hladký jako lahvička s jedem. Ale když se můj klient pokusil o útěk, vy jste ho na policii zbili, že ano? Kdepak, řekl jsem, my jsme se jenom dívali, jestli si tím skokem neublížil, a když jsme viděli, že ne, tak jsme mu domluvili. To musila být pořádná domluva, řekl ten advokát se zdvořilým úsměvem. Podle vysvědčení policejního lékaře měl můj klient následkem té domluvy tři žebra zlomená a asi sedm set čtverečních centimetrů krevních podlitin hlavně na zádech.

Mi nur ŝultrolevis. Li pentis tiom post la riproĉoj, mi diris, kaj estis bone. Sciu, kelkio estas vero; sed oni devas trovi por ĝi la ĝustan vorton."

Já jsem krčil rameny. To on si tu domluvu tak vzal k srdci, řekl jsem, a bylo dobře. Víte, ono je ledacos pravda; ale musí se na ni nalézt to pravé slovo."